

La **strikta relativeco** rilatas nur al la movo de inerciaj sistemoj (sistemoj moviĝantaj je unuformaj kaj rektliniaj rapidoj). La **ĝenerala relativeco** rilatas al la akcelataj movoj kaj al la gravitaj kampoj.

Principo de relativeco – La principo estis vortigita de la itala fizikisto *Galileo Galilei* (1564-1642) en la ĉefverko "Dialogo pri la du maksimumaj sistemoj de la mondoj ptolomea kaj kopernika". *Galileo* montras, ke pasaĝero, enfermita en holdo de ŝipo kiu moviĝas je unuforma kaj rektlinia rapido sur kvietaj maro, ne povas juĝi kaj la rapidon kaj la direkton de la ŝipo per eksperimentoj plenumitaj nur en la holdo de la ŝipo (sen rigardi el iu bov-okulo ekster la ŝipo). Laŭ la principo de relativeco, *Einstein* antaŭsupozas, ke ĉiuj naturaj leĝoj estas invariantaj en ĉiu ajn inercia sistemo.

Konstanto c – La eksperimentoj kaj la elektromagneta teorio montras, ke la lumrapido estas ĉiam egala al konstanto c . Laŭ la principo de relativeco, *Einstein* supozas, ke la lumrapido estas egala al konstanto c en ĉiu ajn inercia sistemo. Plue, pro konvencio, *Einstein* supozas, ke la lumrapido estas konstanta laŭ ĉiu ajn direkto, kaj laŭ irado kaj laŭ reveno inter du lokoj.

Transformitaj ekvacioj de Lorentz – Bazaj formuloj de la strikta relativeco, origine proponitaj de la fizikisto *H.A. Lorentz* (1853-1928), poste deduktitaj de *Einstein* el la du principoj de relativeco kaj de konstanta lumrapido. La formuloj prezentas la rilatojn de spaco kaj tempo inter du inerciaj sistemoj.

Sumo de la rapidoj – Konsekvence de la du bazaj principoj, la sumo de la rapidoj ne povas transpasi la lumrapidon c , kiu estas maksimuma rapido.

Tempodilatado – Konsekvence de la du bazaj principoj, moviĝantaj (en la spaco) horloĝoj batas la tempon je malpli granda frekvenco ol senmovaj (lokfiksataj en la spaco) horloĝoj.

Kvantuma energio – Formulo de *Einstein*, publikigita 1905, kiu prezentas energion de luma ondo, aŭ fotono, kiel produkton de la frekvenco kaj de la minimuma konstanta kvantuma energio h , proponita 1900 de la fizikisto *Max Planck* (1858-1947).

Adreso de la aŭtoro

Ing. Sergio LODI

Via Donizetti, 6

IT – 41036 Medolla (MO)

ITALIO

<sergio.lodi@tecnasrl.com>

Priaŭtoro informo

La aŭtoro estas elektronika inĝeniero, magistriginta 1974 ĉe Universitato de Bolonjo, Italio. Li nun laboras en malgranda entrepreno, kiu projektas kaj konstruas industriajn mezurilojn.

La timoklandaj rumanoj en la XIX-a jarcento*

Doru NEAGU

"Grava afero menciinda estas tio, ke la plejmulto el la vilaĝoj apud Danubo kaj ene de la Kontinento (t.e. la Balkana Duoninsulo) apartenas al rumanoj ... De Beogrado ĝis *Negotin* en Serbio kaj poste en Turkio (nun en Bulgario), ĉiuj vilaĝoj apartenas al puraj rumanoj ĝis *Vidin*, de kie komenciĝas la tataraj hordoj" notis post vojaĝo en Beogradon eksa prefekto *G. Căliman*⁽¹⁾ dum la regado de princo *Alexandru Ioan Cuza* (1859-1866 sur la trono de Rumanio).

La timoklanda teritorio⁽²⁾ eniris en la XIV – XV-aj jarcentoj sub la otomanan regadon⁽³⁾. En 1804 eksplodis la serba naciliberiga ribelo, estrita de *Đorđe P. Karađorđević*. Tri jarojn poste, kiam serbaj ribelintoj provis proksimiĝi al la rusa armeo (dum la rusa-turka milito 1806-1812) "unuafaje serboj konkeris kaj regis la Krajan regionon" (sur la maldekstra bordo de la rivero *Timok*), kiun ili devis forlasi post 1813, kiam la turkaj trupoj venkis – por mallonga tempo – la serban liberigan movadon (*G. Zbuche* 1998: 46).

Iuj timoklandaj rumanoj "el certa nacia antagonismo" kontraŭis al la serbaj batalantoj⁽⁴⁾, sed la plej multaj el ili apogis la serbojn, ribelintajn kontraŭ la turkoj⁽⁵⁾. Sub la premo de Rusio, per la "Konvencio en *Akkerman*" (hodiaŭ *Bjelgorod Dnestrovskij*, 1826) kaj la "Pac-kontrakto de *Adrianopolo*" (hodiaŭ *Edirne*, 1829), la Otomana Imperio akceptis la cedon de Krajan regiono al Serbio. En 1833⁽⁶⁾ serbarusa-turka komisiono fiksas la landlimon inter la aŭtonoma Serbio kaj Bulgario – ĉi-lastata tiutempe ankoraŭ sub la turka regado – laŭ la rivero *Timok*⁽⁷⁾. Tiel estis disigitaj, laŭ administra kaj politika vidpunktoj, la timoklandaj rumanoj en du teritoriajn grupojn: en Serbio kaj en Bulgario.

* Presentata en junio 2000 dum la 3-a Danuba Esperantista Forumo en *Timișoara*, Rumanio.

Ĉi tiu transpreno de la teritorio inter la riveroj *Timok* kaj *Morava* "ne okazis laŭ etnografiaj konsideroj, nek historiaj aŭ geografiaj" sed politikaj kaj strategiaj, ĉar temis pri fakta pligrandiĝo de la rusa influo en Balkanio.⁽⁸⁾ Ĉi tiu regiono revenis lastfoje, kaj nur portempe, sub otomanan regadon en 1876-1877, por ke ĝi apartenu poste definitive al Serbio. La ĉi-regionaj loĝantoj partoprenis la kamparanan ribelon en 1883, kiam ekonomiaj kialoj (*N. Ciachir* 1987: 273) plektiĝis kun enlandaj konfliktoj inter la radikaluloj de la politikisto *Nikola Pašić* kaj la konservativuloj apogantaj la aŭtoritatan reĝimon de la freŝe proklamita reĝo *Milan* (1868-1889, reĝo el 1882). La ribelo estis venkita kaj ĝiaj estroj pendigitaj (*N. Ciachir* 1968: 193-194; *C. Velichi* 1970: 174).

La timoklandaj rumanoj eniris en la atenton de la rumanoj kaj fremdaj intelektuloj precipe fine de la XIX-a jarcento kaj komence de la XX-a. Inter tiuj, kiuj skribis pri ili, troviĝis la germanoj *F. Kanitz* (1868, 1875, 1877, 1907) kaj *Gustav Weigand* (1900, 1907), la serbo *Tihomir Đorđević* (1906, 1919), la hungaro *János Szabó*, la bulgaro *Stefan Romanski* (1916) kaj la rumanoj *C. Constante* (1907), *G. Giuglea* (1911), *George Vâlsan* (1911, 1913, 1937), *Leon T. Boga* (1913), *I. Ordeanu* (1919), *Dumitru Drăghicescu* (1919), *Emanoil Bucuță* (1923), *Constantin Noe* (1939), *Marin Popescu-Spinei* (1939, 1941), *N.A. Constantinescu* (1941) [*N.A. Constantinescu* 1941: 3-4, 20-40; kp. *M. Popescu-Spinenei* 1941: 23-24], *G. Zbucea* (1998) ktp.

Pri la origino de la timoklandaj rumanoj – kiujn serboj nomas *vlasii* (*T. Georgevici* 1943: 24) – aperis kontraŭdiraj opinioj. Rumanoj aŭtoroj rigardas ilin kiel aŭtolitonojn⁽⁹⁾, dum aliaj aŭtoroj, precipe bulgaraj (*S. Romansky* 1927: 14) kaj serbaj (*T. Georgevici* 1943: 39, 132-142), skribis pri malfrua koloniado rumana post la eniro de tiu regiono en la serban ŝtaton.⁽¹⁰⁾

La rumanoj de Serbio loĝas plejmultnombro en la nordorienta parto de la lando, inter Danubo, *Timok*, *Morava* kaj la *Ratna* montaro⁽¹¹⁾ sur areo de 12 240 kvadrataj kilometroj⁽¹²⁾ en 4 distriktoj: *Timok* (subdistriktoj *Zaječar* kaj *Bolovac*), *Morava* (subdistriktoj *Parakin*, *Despotovac* kaj *Resava*), *Požarevac* kaj *Krajna* (*T. Georgevici* 1943: 27; kp. *D. Draghicecso* 1919: 7; *C. Constante* 1929: 5). En 1906 *Tihomir Đorđević* skribis, ke en Serbio ekzistis 485 vilaĝoj kie vivas rumanoj kaj en 165 ili estis tiutempe la plejmulto de la loĝantaro.⁽¹³⁾

La serbiaj timoklandanoj rumanoj diferenciĝas laŭ idiomo, kostumo kaj kutimoj en du ĉefajn grupojn: a) *țărani*, "kamparanoj", t.e. "tiuj rumanoj kiuj alvenis el Rumanio (Valaĥio)" kaj loĝas precipe en la *Krajna* distrikto, kaj b) *ungureni*, "hungarianoj", t.e. "tiuj rumanoj kiuj alvenis el Hungario" (fakte el Transilvanio kaj Banato, kiuj tiutempe apartenis al la Hungara Reĝlando) kaj kiuj loĝas en la monto-regiono, kaj *oltenii*, "oltenoj", t.e. "kamparanoj", en la Danuba ebenaĵo (laŭ *M. Popescu-Spinei* 1943: 30-31). Precipe vilaĝanoj (*T. Georgevici* 1943: 31-35; vd. *A. Popovici* 1943: 119-125), la serbiaj timoklandaj rumanoj okupiĝis pri terkulturado kaj brutbredado. Ilia popolkulturo konservas multajn praktikojn, el kiuj iuj jam perdiĝis ĉe la norddanubaj rumanoj (*M. Popescu-Spineni* 1941: 23). Ili ĉiuj estas ortodoksaj kristanoj (*T. Georgevici* 1943: 36).

Ĝis la eniro de la regiono en la Serban ŝtaton, ili havis siajn proprajn pastrojn, diservojn kaj religiajn librojn rumanlingvajn. Iom post iom, la rumanojn pastrojn anstataŭis la serbaj, kaj la liturgiaj libroj rumanlingvaj estis konfiskitaj kaj eble detruitaj.⁽¹⁴⁾ Pri la publika instruado *F. Kanitz* notis, ke "en Serbio ... la registaro prizorgis la funkciadon de lernejoj por ĉiuj naciaj minoritatoj – kompreneble en la serba lingvo".⁽¹⁵⁾ La serbaj aŭtoritatoj agnoskis, ke eĉ sen rumanlingvaj lernejoj kaj preĝejoj, la timoklandaj rumanoj rezistis al asimilado: el 122 499 rumanoj registritaj laŭ la popolnombro en 1900, nur 32 556 konis la serban lingvon (*T. Georgevici* 1943: 35).

En Bulgario, la rumanoj loĝis en la norda parto de la lando sur la bordo de Danubo ekde *Timok* – la limo kun Serbio – ĝis *Nikopol* (*D. Cantemir* 1983: 423; *C. Velichi* 1945: 89). Laŭ la plejmulto de la bulgaraj sciencistoj, ili originis norde de Danubo, de kie ili alvenis precipe dum la XIX-a jarcento (vd. *V. Nestorescu* 1996: XI-XIV). La rumanoj aŭtoroj opinias ilin aŭtolitonoj⁽¹⁶⁾ sen ekskludi iujn almigradajn fenomenojn el la nuna rumania teritorio.⁽¹⁷⁾ Ĝis la XIX-a jarcento ilia historio estas la sama kiel tiu de la serbiaj rumanoj (*T.N. Trâpcea* 1942: 219-242). Post 1833 la timoklandaj rumanoj de Bulgario restis sub la otomana regado.⁽¹⁸⁾ Dum la balkana krizo de 1875-1878 la rumanoj el la regiono de *Vidin*, sub la influo de rusaj "agentoj" kaj lige kun la Bulgara Komitato en Bukureŝto, eksplodigis kontraŭturkan ribelon en majo-junio 1876. La movadon venkis la otomana armeo, estrita de la fama generalo *Osman-Paŝao*. Kvar ribelintaj vilaĝoj – *Bregovo*, *Novesâl*, *Gânzovo* kaj *Balej* – estis bruldetruitaj

kaj 800 kamparanoj masakritaj.⁽¹⁹⁾ Sekvis la Rusa-Turka Milito de 1877-1878, kiun partoprenis ankaŭ la rumana armeo, kies atento celis – fine de la milito – ĝuste la nordokcidentan Bulgarijon.

Laŭ iuj historiistoj (*N.A. Constantinescu* 1941: 79; *G. Zbucea* 1998: 46) Rusio estus akceptinta cedi la Vidinan regionon al Rumanio kontraŭ la Suda Besarabio, sed tiun ideon malakceptis Aŭstrio-Hungario. La "Memoroj" de la rumana princo Karolo la I-a (1866-1881, reĝo inter 1881-1914) menciis la priokupiĝon de la Vienaj aŭtoritatoj pri eventuala regado rumana en la regiono kaj la promeson de la rumana diplomatoj, ke la rumana armeo estis retiriĝonta el *Vidin* tuj post kiam Turkio pagintus siajn militkompensojn (*Memoiriile* 1994: 49), sed tute ne mencias tian proponon flanke de Rusio.

Ekde 1878 la Vidina regiono apartenas al Bulgario. La bulgariaj rumanoj estas ankaŭ ĉi tie nomataj *vlahoj* sed ili mem nomas sin *rumâni*, t.e. rumanoj (*C. Sandu-Timoc* 1996: 2). Ilia nombro estas eĉ pli malfacile sciebla ol en Serbio. Laŭ la oficiala popolnombro de 1905 en la tuta distrikto de *Vidin* troviĝis 44 122 rumanoj.⁽²⁰⁾ En 1891 la historiisto *Constantin Jireček* indikis 49 070 rumanojn en la tuta Bulgario, kaj *Gustav Weigand* en la jaro 1907 en la regiono de *Vidin* 40 000, kaj 13 000 en la regiono de *Vraca*.⁽²¹⁾ Rumanoj loĝas norde de Balkanoj en 50 vilaĝoj tute rumana laŭ loĝantaro, kaj en 25 vilaĝoj kune kun aliaj etnoj (precipe bulgaroj) en la regionoj de *Vidin*, *Kula*, *Lom*, *Orjahovo* (rum. *Rahova*), *Pleven* (rum. *Plevna*) kaj *Nikopol* (*C. Velichi* 1945: 89). La rumaniaj bulgaroj apartenas al tri apartaj grupoj etnografiaj (kvankam malpli diferencaj ol en Serbio): a) *vălenii*, "valanoj" aŭ *dunărenii*, "danubanoj", en la regiono antaŭ la rumana ĉedanuba urbo *Calafat* en la vilaĝoj: *Balej*, *Bregovo* (rum. *Bregova*), *Kosovo* (rum. *Cosova*), *Gănzovo* (rum. *Gănzova*), *Rakitnica* ktp., b) *câmpenii*, "kampanoj", antaŭ la rumania regiono *Vânju Mare-Severin* en la vilaĝoj: *Kapitanovci*, *Florentin*, *Jasen*, *Negovanovci*, *Stanotârn* ktp. kaj c) *delenii* aŭ *pădurenii*, "arbaranoj", suden en la vilaĝoj *Kalenik*, *Kanitz*, *Perivolec*, *Rabrovo* ktp. (*E. Bucuța* 1923: 14, 48; *V. Nestorescu* 1996: V-VII). Ili havas la samajn okupojn kiel tiuj en Serbio. La kultura vivo rimarkigas per interesa buŝ-literaturo enhavanta plurajn influojn transdanubajn (t.e. el Rumanio) (*E. Bucuța* 1923; *V. Nestorescu* 1996).

La rumanoj de la Vidina distrikto uzis la propran lingvon en siaj preĝejoj ĝis 1923, sed la bulgara ŝtato aperinta ekde 1878 neniam akceptis la aperon de apartaj lernejoj por la suddanubaj rumanoj.⁽²²⁾

Resumo

Jam en la mezepoko ekzistis grava nombro da rumanoj ĉe Danubo en Serbio kaj Bulgario. Ili koncentriĝas ambaŭborde de la landlima rivero *Timok*, kaj tial ili estas konataj en Rumanio kiel "timokanoj". Bulgaroj kaj serboj nomas ilin "vlahoj". Kvankam ili esceptokaze uzis la rumanan lingvon por la preĝeja servo, la sendependiĝintaj serba kaj bulgara ŝtatoj neniam permesis al ili, havi propralingvajn lernejojn.

Demografia aldono

A) Rumanoj en Serbio laŭ *T. Georgevici* (1943, p. 29-30, vd. ankaŭ "Bibliografiaj referencoj):

Distrikto	1859		1846	
	Rumanoj	Serboj	Rumanoj	Serboj
<i>Crna Reka</i>	19 545	18 719	18 719	26 658
<i>Kuprija</i>	7 348	35 563	8 064	41 852
<i>Požarevak</i>	36 696	62 999	47 690	74 969
<i>Krajna</i>	33 626	18 272	42 607	20 304
Entute	97 215	122 593	135 553	163 783

Ĉi tiujn ciferojn kontestis iuj rumana aŭtoroj. Laŭ *C. Constante* (1943, p. 14) en 1905 en tiuj kvar distriktoj loĝis 362 769 personoj el kiuj 351 806 estis rumanoj.

La oficialaj popolnombroj en Serbio indikas jenan evoluon demografian (*T. Georgevici* 1943, p. 29-34) kun bibliografio. Vd. ankaŭ *G. Zbucea* (1998, p. 46), kiu transprenas la statistikon sen indiki la fonton:

Jaro	Serboj	Rumanoj
1866	1 215 576	127 326
1884	1 626 263	149 727
1890	1 975 975	143 684
1895	2 089 767	159 729
1900	2 262 518	122 499

B) Rumanoj en Bulgario

En 1905 en la distrikto *Vidin* troviĝis laŭ *E. Bucuța* (1923, p. 51-52):

Etnoj	Subdistrikto <i>Kula</i>	Subdistrikto <i>Vidin</i>
Bulgaroj	32 338	34 816
Rumanoj	11 759	28 404
Entute (inkl. aliaj)	44 566	69 791

Notoj

- (1) G.T. Călimană : *Echilibrul în Orientul seu Serbia și România – Voiagi* (Ekvilibro en Oriento aŭ Serbio kaj Rumanio – Vojaĝo). *București*, 1865: 56 cit. laŭ N.A. Constantinescu 1941: 22-23. Jam en 1840 la rumana historiisto kaj ekonomikisto Nicolae Bălcescu (1819-1852) skribis "pri la 40 000 rumanaj familioj loĝantaj ĉe Danubo en Serbio (cit. laŭ M. Popescu-Spineni, 1941: 23)
- (2) Timok estas rivero, kiu hodiaŭ formas ĉe Danubo la landlimon inter Bulgario kaj Serbio.
- (3) G. Zbucnea 1998: 44-45. Pri la historio de ĉi tiu regiono antaŭ la otomana okupacio vd. T.N. Trâpcea 1942: 219-242.
- (4) Kun 3000 ribelintoj, Karadordević atakis 13 rumanajn vilaĝojn kaj "kiel puno por ilia malamika sinteno rilate al la serba revolucio, ili estis forbruligitaj" (N.Iorga: *Istoria statelor balcanice în epoca modernă. Lecții ținute la Universitatea din București* (Historio de la balkanaj ŝtatoj dum la moderna epoko. Lekcioj ĉe la Universitato de Bukureŝto), *București*, 1913: 119 cit. laŭ N.A. Constantinescu 1941: 74.
- (5) La plej bone konata timoklanda estro en la Serba Liberiga Milito estis hajduko Velku "kiun la timokana poezio prezentis kiel rumanon el *Krajna* (Samloke: 74, n.4, kie estas menciitaj ankaŭ liaj malakordoj kun Karadordević. Kp. kun N.Ciachir 1987: 74).
- (6) Iuj rumanaj historiistoj konsideris, ke antaŭ tiu jaro la Timoka regiono neniam apartenis al Serbio (N.A. Constantinescu 1941: 85)
- (7) G. Zbucnea 1998: 45. La serba princo Miloš Obrenović devigis Turkion akcepti la cedon post kiam la serbaj trupoj okupis la koncernajn distriktojn (*Krajna, Čačak, Timok, Kruševac, Crna Reka, Užice*) perditajn en 1813 (N. Ciachir 1998: 88).
- (8) Tion agnoskis eĉ Miloš Obrenović mem: "Por niaj rilatoj kun Rusio ĝi (*Krajna*) bezonatas kiel la ĉiutaga pano" (cit. laŭ G. Zbucnea 1998: 45).
- (9) C. Constante 1929: 5 skribas pri spontanea koloniigo rumana jam en la tempo de Stefan Nemanja.
- (10) Rumanaj esploristoj akceptas la alvenon de 4 grupoj de norddanubaj rumanoj sed en regionon jam loĝatan de rumana praloĝantaro (t.n. almigrado). Vd. M. Popescu-Spineni 1941: 22; G. Zbucnea 1998: 44).
- (11) C. Constante 1929: 5. Iuj rumanaj aŭtoroj opinias tiun teritorion "laŭ geografia vidpunkto dependaĵon de Rumanio" (*D. Draghicescu* 1919: 7; C. Noe 1937: 7-8; N.A. Constantinescu 1941: 17-19).
- (12) D. Draghicescu 1919: 7; C. Constante 1929: 5. Laŭ aliaj aŭtoroj la areo enhavas 10 773 km² (S. Romansky 1927: 16) aŭ 10 777,7 km² (T.N. Trâpcea 1942: 207).
- (13) T. Georgevici 1943: 28. En memorando prezentita en 1919 al la Pariza Pac-Konferenco por peti la unuigon de Timoklando al Rumanio – demarŝo ne apogita de la rumana registaro – d-ro Atanasie Popovici (mem timoka rumano) revuis en tiuj 4 distriktoj 139 vilaĝojn, kie rumanoj estas la plejmulto, kaj 84 vilaĝojn kun miksitaj loĝantaro (A. Popovici 1943: 119-125).
- (14) T. Georgevici 1943: 146. Li asertas, ke ĉi tiuj libroj konfiskitaj el la rumanaj preĝejoj, troviĝus en la Nacia Biblioteko (samloke: 147).
- (15) F. Kanitz 1943; 17. Laŭ T. Georgevici 1943: 145 neniam la tiuregionaj rumanoj pretendis havi lernejojn en sia nacia lingvo.

- (16) La moldava princo Dimitrie Cantemir (1673-1723) konsideras, ke ili estas "restaĵoj" de la romianoj alportitaj de la romia imperiestro Aŭreliano (270-275 sur la trono) el Dakio (D. Cantemir 1983: 113).
- (17) I. Durianov, "Anthroponymes roumaines", *Analele Universității București. Limbi și literaturi slave*, *București*, 1979: 27-28 cit. laŭ V. Nestorescu 1996: XIV.
- (18) Fortaj kontraŭturkaj ribeloj okazis en la regiono de Vidin en 1560 kaj 1849 (C. Sandu-Timoc 1996: 27).
- (19) N.A. Constantinescu 1941: 78. La ribelon estris la rumana kamparano Ion Ciolac el Bregovo (C. Sandu-Timoc 1996: 27). Eĉ la rumana nacia poeto Mihai Eminescu (1850-1889) aprezis la bravecon de la ribelintoj (laŭ G. Zbucnea 1998: 40).
- (20) E. Bucuta 1923: 51-52. En 1907 la germana filologo Gustav Weigand, kiu vizitis la regionon, skribis, ke bulgarioj loĝis grandnombre nur en la urbo Vidin (laŭ M. Popescu-Spineni 1941: 40).
- (21) M. Popescu-Spineni 1941: 39-43. Laŭ N.A. Constantinescu 1941: 38 inter Timok kaj Ŝištov vivis en 1912 ĉirkaŭ 100 000 rumanoj.
- (22) C. Sandu-Timoc 1996: 21. En 1863 la monaĥo Samoil Dracșin provis pere de la grekkatolika eklezio, fondi rumanlingvajn lernejojn kaj preĝejojn por la rumanoj de la regiono de Vidin (G. Zbucnea 1998: 46).

Bibliografiaj referencoj

- BUCUȚA Emanoil (1923). *Românii dintre Vidin și Timoc. Cu un adaos de documente, folklor, glosar, fotografii, harți* (Rumanoj inter Vidin kaj Timok. Kun aldono de dokumentoj, folkloro, glosaro, fotoj, mapoj) s.l.: *Carte Românească*.
- CANTEMIR Dimitrie (1983). *Opere complete* (Kompleta verkaro). IX, 1, ed. Dan Slușanschi, *București*: Edit. Academiei R.S.R.
- CIACHIR Nicolae (1968). *România în sud-estul Europei. 1848-1886* (Rumanio kaj la sudorienta Eŭropo. 1848-1886). Ed. *Politica, București*.
- CIACHIR Nicolae (1987). *Istoria popoarelor din sud-estul Europei în epoca modernă. 1789-1923* (Historio de la sudorienteŭropaj popoloj dum la moderna epoko. 1789-1923). Edit. *Științifică și Enciclopedică, București*.
- CIACHIR Nicolae (1998). *Istoria universală modernă. II: 1789-1919* (Moderna mondhistorio. II: 1789-1919). *Oscar-Print, București*.
- CONSTANTE C. (1928). *Românii din valea Timocului și a Moravei* (Rumanoj en la valo de Timok kaj Morava). *Institutul de Arte Grafice "Eminescu"*.
- CONSTANTINESCU N.A. (1941). *Chestiunea timoceană. 1. Vechimea și importanța blocului românesc din Dacia Aureliană. 2. Istoricul regiunii timocene. 3. Drepturile României* (La timokana afero. 1. La antikveco kaj graveco de la rumana bloko en la Aŭreliana Dakio (inter Morava/Lom). 2. Historio de la timoka regiono. 3. La Runaniaj rajtoj). *Bucovina I.E. Torouțiu, București*.
- DRAGHICESCU Dumitru (1919). *Les Roumains de Serbie. Paris*.
- GEORGEVICI Tih(omir) (1943). *Printre Românii noștri* (Inter niaj rumanoj) (1906) tradukita el la serba en la rumanan fare de C. Constante, kaj *Adevărul asupra Românilor din Serbia* (La vero pri la serbiaj rumanoj) (1919) tradukita el la franca de la sama, en *Românii*.

KANITZ F. (1943). *Serbia. Studiu de calatorie istorico-etnografic* (1904): (Serbio. Vojaĝa studo historia-etnografia), tradukita el la germana en la rumanan fare de S. Baciu, en *Românii*.

Memoriile (1994) = *Memoriile regelui Carol I al României de un martor ocular* ("La memoroj de la reĝo Karolo la I-a de Rumanio", verkitaj de proksima atestanto). Ed. Stelian Neagoe, IV, 1878-1881, București. Machiavelli.

NESTORESCU Virgil (1996). *Românii timoceni din Bulgaria. Grai. Folclor. Etnografie* (Timokaj rumanoj en Bulgario. Idiomo. Folkloro. Etnografio). București. *Fundația Culturală Română*.

NOE Constantin (1937). *Din trecutul Timocului* (El la pasinteco de (la regiono de) Timok). *Timocul*, București, p.1-3

POPESCU-SPINENI Marin (1941). *Românii din Balcani. Aspecte geopolitice și economice* (Rumanoj en Balkanio. Geopolitikaj kaj ekonomiaj aspektoj). *Tiparul Universitar*, București.

POPOVICI Atanasie (1943). *Memoriul românilor din Serbia, 1919* (La memorando de la Serbiaj rumanoj, 1919), en *Românii*.

ROMANSKY St. (1927). *Românii dintre Timoc și Morava* (Rumanoj inter Timok kaj Morava). Rumana traduko de Florea Ionescu en *Graiul Românesc*, București, I, p. 1

Românii (1943). *Românii din Timoc. III: Românii dintre Dunăre, Timoc și Morava. Culegere de isvoare* (Rumanoj de Timok. III: Rumanoj inter Danubo, Timok kaj Morava". Kolekto de fontoj). București: *Societatea Română de Statistică*.

SANDU-TIMOC Cristea (1996). *Tragedia românilor de peste hotare* (9-13 milioane). (La tragedio de la eksterlandaj rumanoj (9-13 milionoj). *Timișoara, Astra Română*.

TRĂPCEA Th. N. (1942). *Contribuții la istoria românilor din Peninsula Balcanică* (Kontribuoj pri la historio de la rumanoj en la Balkana Duoninsulo), *Balcania*, București, V, 1, p. 219-242

VELICHI Constantin (1945). *Românii din Bulgaria înainte de 9 Septembrie și astăzi* (Bulgariaj rumanoj antaŭ la 9-a de septembro 1044 kaj hodiaŭ). *Archivele Nationale Istorice ale României*. București. *Fondul Ministerului Culturii Naționale și Cultelor*, d. 4336

VELICHI Constantin (1970). *Imperiul Otoman și statele din Balcani între 1878-1912*. (La Otomana Imperio kaj la balkanaj ŝtatoj inter 1878-1912). *Studii și articole de istorie*, XV, București.

ZBUCHEA Gheorghe (1998). *Românii timoceni* (Timokaj rumanoj). *Dosarele istoriei*. București, III, 6, p. 44-45

Adreso de la aŭtoro

S-ro Doru NEAGU

Aleea Policlinicii

B1. G9, Sc.1, E7, Ap.16

RO – 6100 B r a i l o

RUMANIO

<doru_neagu@k.r>

La komedio "Galanta Merkuro" de Edmé Boursault

(Originaleco de ideoj kaj formo)

Ljudmila MURSALIJEVA

Edmé Boursault (1638-1701) – kies nomon la aŭtorino de tiu ĉi mallonga eseo asimilas al Esperanto per Edmeo Bursoo, jam por la teksta oportuneco de la kutimaj derivaĵoj post esperantigita nomformo – estis samtempulo kun la plej granda komedi-verkisto en Francujo: Moliero (1622 – 1673).

Edmeo naskiĝis en Burgonjo, en familio de militisto. En la jaro 1651 li venis al Parizo kaj komencis literaturan verkadon. "Li estas unika aŭtoro, kiu, tute nesciante antikvajn lingvojn, sukcesis ne nur korekte skribi, sed fariĝis vera majstro de la lingvo; li kreis originalajn kaj ridigaĵajn komediojn, kiujn ne ĉiu verkisto kuraĝus montri en teatro. Bursoo havis naturan talenton, li uzis siajn internajn rezervojn".⁽¹⁾

Liaj plej bonaj teatraĵoj longe restadis en la repertuaro de la franca teatro, kion pravas multvoluma franca dramverkaro, eldonita en 1802.⁽²⁾ Edmeo Bursoo estis konstanta dramverkisto de "Burgonja Hotelo". En la jaro 1661 li debutis per unuakta komedio "Fluganta kuracisto", kreita en la tradicioj de masko-komedio. La intrigo baziĝas sur ŝajna malsano de la juna protagonistino. Ŝia patro deziras ŝian geedziĝon kun la viro, kiun li elektis. La junulino ŝajnigas malsanon por malhelpi la geedziĝon. La servisto de ŝia amato alvestiĝas kiel kuracisto. En la teatraĵo li ludas diversajn rolojn, aperas en diversaj vestaĵoj, saltas el unu fenestro en la alian – de tio venas la titolo de la komedio. Bursoo en sia komedio imitis la samtitolan teatraĵon de Moliero, kopiis apartajn scenojn.

Poste Bursoo verkis triaktan versoforman komedion "La viva mortinto". Du amikoj amas la saman junulinon. Unu el ili, por liberigi sin de la rivalo, friponas: li sendas al la rivalo falsan leteron pri la morto de lia patro kaj la neceso, urĝe veturi al ties enterigo. La servisto de la fripono alvestiĝas kiel fantomo de la morta patro, kaj li ve-